


CERBE kaj KORE



**KULTURA SUPLEMENTO
AL LA REVUO "PONTO" N-RO 109**

N-RO 12 (80), DECEMBRO 2019

Enhavo

Honore al 160-jariĝo de Lazaro Zamenhof

Vladimir Opletajev. Historio de la Zamenhof-festo 3

Klara Ilutoviĉ. Zamenhof-tage 4

Tatjana Auderskaja Al la monumento de L. Zamenhof 5

Originala poezio

Mikaelo Bronŝtejn. Novaj poemoj 6

Tatjana Auderskaja. Revoluciulo 8

Limerikoj 9

Klara Ilutoviĉ. Tria aĝo 10

Historio


James Piton. Ĉu vi parolas Agresanton? 11

Kultura historio

Gennadij Ŝlepĉenko. La unua rusa traduko de Laŭzi 16

Kantoj

Andrej Makareviĉ. Blua birdo. Tradukoj de Rustam Karapetjan kaj
Valentin Melnikov 18



Bildo de V. Opletajev

Honore al 160-jariĝo de Lazaro Zamenhof

Historio de la Zamenhof-festo¹

Vladimir Opletajev (Surgut)

Ĉiujare meze de decembro (la 15-an de decembro 1859 naskiĝis la Majstro) en multaj urboj de la mondo estas okazigata Zamenhof-festo per kiu esperantistoj omaĝas al la kreinto de Esperanto kaj dediĉas sian atenton al la Esperanta literaturo. Tiu ĉi populara festo havas pli ol okdekjaran tradicion kaj estas nun integra parto de la tutjara esperantista kalendaro. Oni ŝuldas la aranĝon al la fama hungara verkisto, poeto, aktoro, instruisto Julio Baghy (1891–1967) pro lia iniciato akceptigi la ideon pri la Tago de la Esperanta literaturo.

En 1927 en la urbo Dancigo okazis la 19-a UK, kiu celebris la 40-jariĝon de Esperanto. Sur la urba Esperanto-placo estis plantita jubilea kverko. Julio Baghy pere de la hungara esperantisto Pál Balkányi proponis al la Kongreso, ke la 15-a de decembro estu la tago de la Esperanto-literaturo, kaj 905 kongrespartoprenantoj el 35 landoj unuanime aprobis la proponon. Jam decembre de la sama jaro en pluraj urboj okazis unuaj tiaspecaj festoj.


Plie la ideon de la decembra festo popularigis Izrael Lejzerowicz (1901–1944), kiu en la ĉapitro XII de sia fama satira verko «El la „Verda biblio“» (1935) admonis la esperantistaron celebri la Esperanto-libron. «1. En la dekkua monato de la jaro, en la dekkvina tago de tiu monato, festu la Feston de la libro. ... 3. Vespere kunvenu en viaj rondoj kaj grupoj, jubilu pro la potenco de nia verda afero. 4. Apogu viajn korojn per ĝojo kaj rido, kantoj kaj poemoj aŭdiĝu inter vi.»

Nuntempe inter la organizantoj de la Zamenhof-festo estas malgrandaj rondetoj kaj multpersonaj kluboj, fakaj grupoj kaj societoj, landaj asocioj kaj internaciaj organizaĵoj. Ankaŭ la programoj de la festo varias: en iuj urboj ili posedas jam tradiĉiĝintajn erojn kaj intiman familian etoson, en la aliaj ilin distingigas neordinaraj kaj tre modernaj trajtoj. Por multaj esperantistoj la festo gravas pro la eblo senpere manifesti sian esperantistecon kaj identigi sin kun la internacia kultura medio. Ĝi estas ankaŭ konvena preteksto por prezento (inkluzive la eksteran publikon) de la kulturaj valoroj generataj kaj perataj de la esperantista komunumo.



La komuna foto de la 19-a Universala Kongreso en Dancigo.

¹ Represo de la artikolo: Opletajev V. Historio de la Zamenhof-festo. // «Bulteno de REU». — decembro 2013. — №79. — p. 1. // «Rusia Esperanto-gazeto». — decembro 2013. — № 6 (79). — p. 20.



Zamenhof-tage

Klara Ilutoviĉ

Ekbrilis lia stel' de l' granda faro,
Kaj kiel estimata okulist'
Senigis li okulojn de l' homaro
je blinda fermiteco de l' ekzist'.

Katenas bonajn emojn plu fantomo
De l' nevenkebla lingva gent-obstin'.
Mi ne komprenas vortojn de la homo –
Do, fakte, ĉu mi vere vidas lin?

Donacis li la lingvon de espero
Pli bone vidi homojn per kompren'
Por ĉiulande sur la tuta tero
Aliri ilin sen la lingva ĝen'.

La vivon vidas jam alloge hela
L' esperantist' el sia patroland'.
Proksimas dank'al la vidsent' fidela
La tuta mondo ĝis l' ekstrema rand'.

Kaj senestinge verdu lia stelo
Spite al ajna suferiga blov'!
Kaj Esperanton gardu ĝia celo!
Plej koran dankon, majstro Zamenhof!

Decembro, 2019

Al la monumento de L. Zamenhof

Tatjana Auderskaja

Arde laboris skulptist' por vidigi animon de l' viro,
Kiu donacis al ni lingvon komunan por Ter'.
Ankaŭ l' anim' de l' skulptist' al la sama ideo impetis,
Ambaŭ strebis al cel' nobla de l' interkonsent'.

Vi, kiu staras en kort' antaŭ l' busto de l' homo sublima,
Venis vi kiel turist', kiu gapas al la vidindaĵ'?
Aŭ eĉ aŭdis vi ion pri l' homo kaj faro?
Sed ĉu vi mem agis sincere por bon'?

Flagris en via anim' flamo de l' am' al homaro?
Faris vi ion por Hom', sincere kaj sen memador'?
Se ne okazis por vi tia ŝanco en vivo sencela,
Vin ne koncernu l' afer' kaj strebado al monda fratec'.

Staras modeste en kort' monumento malnova,
Restas la revo pri l' voj', sed la vojon forviŝas la temp'...
Iru, turisto, rigardi al la vidindaĵoj!
Estas montrita la voj'. Sed la vojo ne estas por vi.



Monumento al Zamenhof far Nikolaj Blajkov en Odeso, starigita en 1959

Originala poezio Mikaelo Bronŝtejn (Tihvino)

Mikaelo Bronŝtejn estis proklamita Esperantisto de la jaro laŭ versio de REU la 15.12.2019. Okaze al tiu evento ni publikigas kelkajn liajn novajn poemojn



Pardonu, ne, ne leciono,
Jes, dume nur interesigo,
Sed por la avo tiu bono
Jam estas kaŭzo por feliĉo,
Ĉar, eble, levos poste l' genoj
Ŝin super ĉiutaga vanto, -
Per diaj kaj per avaj benoj
Ŝi venos al poem' kaj kanto.

Apenaŭ distingebla en krepusko
Glimetis fora celo antaŭ mi.
La kor' impetis, frapis en la brusto,
Sed la racio, tute sen admir',

Trankvile streĉis okulparon mian
Al la direkto de la fora glim',
Komprenigante, ke impeti tien
Signifas tuj fariĝi la viktim'

De ruza tromp', falsaĵo triviala,
Miraĝ', fantoma spuro, iluzi'!
Sed papilie mi impetis al la
Fajret' vokanta, ĉar ekkredis mi

Ke atingeblas... Nun, ĉe l' vivofino,
Mem pri la vivo demandante min,

Resumas mi, ke bonas la destino,
Min direktinta al la voj' sen fin',
Kaj lace, kun rideto ironia,
Konfesas sen hezito, sen ŝancel',
Ke tro enua estus iro mia
Sen tiu ĉi glimanta fora cel'.



Neĝo, la vintra signo,
En la arbara sino
Branĉojn ornamis feste –
Kontraŭ modera prez' de
Frosta decembro-eko.
En la animoteko
Tiu abi-ornamo
Trovas en senta gamo
Puran admiron, miron,
Puŝas ĝin al elir' en
Kri' de l' arbara viro:
- Mi vin salutas, vintro!



Disiĝo en si mem kunportas ĝuon
De dolĉa rev' pri nova renkontiĝo.
Sed efektive mi ne certas, ĉu en
La ĝuo estas multe da feliĉo.

Ni ne kapablas scii nian ontan -
Jen homo planas, sed ridetas Dio -
Do ĉiam, promesante la renkonton,
Mi hontas, ĉar ne certas mem pri tio,

Kaj, preferante ĝui tujan nunon,
Brakumas vin ĉe vica "Ĝis revido!",
Kaj kun humilo petas la fortunon
Fojfoje agi ekster Dia rido.

La mistereca nebuleg'
De la arbaro findecembra
Certigas ke en pensa greg'
Nenio povas esti certa.

Trans la sennega ĉirkaŭaj',
Spiranta marĉe kaj humide,
Videblas flame nova paĝ',
Kaj nepre baldaŭ ŝiros mi de
La viv' folion de la jar',
Pasinta inter ĝoj' kaj veo,
Kaj tristo min forlasos, ĉar
Pensado vokas plu al kreo.

Do en la denson de l' nebul'
Mi ne hezitu nun eniri
Kaj paŝi al vokanta brul',
Kaj la certecon reakiri.



Tatjana Auderskaja (Odeso)

REVOLUCIULO



Mi volas esti ŝtala plugilo
Por traplugi tutan la Teron.
Jen gitaro kun grifo
Simila al F-kleo,
Jen papilio bela, gracia kaj delikata,
Jen trifolio svelta sur freŝa verda herbejo.

Ĉion ĉi mi traplugos, enmergos en teron nigran
Kaj poste oni prisemos miajn faŭkantajn spurojn,
Aspektajn kiel la vundoj sur la vizaĝ' de la Tero,
Larĝaj kaj nigraj vundoj kun disŝutantaj randoj.
El ili elkreskos nova, mola kaj verda herbo,
Sed ne plu restos la olda. Nenion oldan mi lasos!
Nur nova gento donos feliĉon al la homaro!

Mi volas esti ŝtala plugilo
Por traplugi tutan la Teron.
Kaj poste iu prisemos
Lasitajn de mi nigrajn spurojn.



Limerikoj

Iu gaja drinkul' el Torino
Iam trinkis tro multe da vino.
En haladz' de l' ebri'
Vidis li inojn tri
En la lok' de la propra edzino.

Iu kalva person' el Kanbero
Promenadis en granda sombrero.
Ho, terura moment'!
Forte blovis la vent',
Kaj ekflugis li al stratosfero.


Iu frizist' el Taŝkento
Amindumis kun granda serpento.
Pro brakuma sufok'
Li vekigis en ŝok'...
Sed ne restis jam tempo por pento.

Bela damo el land' Rumanio
Serĉesploris pri biokemio.
Foje el la matras'
Tralikiĝis la gas'...
Fil' naskiĝis pro la reakcio.

Iu povra soldat' el kazerno
Perdis monon sub strata lanterno.
Jen briletas moner'!
Li sin klinis al ter'...
Lin akceptis profunda poterno.

Iu juna poet' el Lepanto
Enamiĝis al lingv' Esperanto.
Venis li al Kongres',
Sed – ho ve, malsukces'!
Kaj popol', kaj simbol' – por brokanto!

Iu usonanin' el Ĉinio
Tre suferis pro rena hernio.
Dum futbal'-mondial'
Post triop-seks-batal'
De l' malsano jam restis nenio!



Klara Ilutovič (Elektrostal)

La tria aĝo

Noto: Inter finalistoj de la televidprojekto “Voĉo-60+” estis 91-jara virino. Ŝia 69-jaraĝa rivalinbo, kiu venkis en la konkurso, planas studi en konservatorio. Maljunulinoj laboras, studas, pentras, sportumas, vojaĝas. Ili estas aktivaj, ili vivas. K.I.

Labor' en aĝo pensia,
Sen prema hejmado –
La tempo helsugestia
Por nova vivpado.

La vivo daŭras obstine –
Eventoj, koloroj.
Por kio vivi ruine,
En grumbloj kaj ploroj?

Vivŝanĝe io konsternas,
Sed vokas je l' brilo.
Aĝul' vojaĝas aŭ lernas
Por nova utilo.

Li kantas aŭ manlaboras,
Kreante l' vivemon,
Kaj granda aĝ' ne doloras,
Ne vekas la ĝemon.

Komencas foje li ion
Por si nekutiman
Kaj sentas novan radion
De l' vivo subliman.


Ignoru ŝarĝon pensian,
Pri ĝi ne rezonu!
La aĝo prenas la sian,
Sed vi ne fordonu!

Historio

Ĉu vi parolas la Agresantan?

Mi decidis represi tiun ĉi materialon, ĉar la afero estas malmulte konata en esperantista komunumo, sed, laŭ mia opinio, nepre sciinda kaj vere edifa. Kaj ĝi estas bona ilustraĵo por la praktika apliko de la aserto de nia baza dokumento – Bulonja Deklaracio: “Materiala mastro de tiu ĉi lingvo estas la tuta mondo kaj ĉiu deziranto povas eldonadi en aŭ pri tiu ĉi lingvo ĉiajn verkojn, kiajn li deziras, kaj uzadi la lingvon por ĉiaj eblaj celoj” N.G.

La uzado de Esperanto en la Usona Armeo sonis al mi kiel tute eksterreala rakonto. Kial ne? – demandos al mi la plej larĝmensaj samideanoj. Nu, eĉ se mi ne rilatas al la angla kiel al “malamiko” de Esperanto, mi konfesas, ke al mia mallarĝa menso tio plu sonis kiel eksterrealajo. Mi tamen havis enmane konkretajn eldonitajn dokumentojn, nerefuteblajn pruvojn.



En vendejo de kolektanto pri militistaroj mi trovis ekzempleron titolitan "The Maneuver Enemy" (La Manovra Malamiko, 110 paĝoj, Januaro 1953). Ĝi estas unu el la t. n. FM (Field Manual), el serio kun centoj aŭ eĉ miloj da praktikaj manlibroj de la usona Departemento pri Armeo. La specife menciita titolo estas gvidilo por usonaj trupoj partoprenantaj strategiajn ekzercojn. Per la nomo "Agresanto" oni distingas la ekzercan malamikaron. Parto de la usonaj soldatoj rolis en teamo kiel fikcia lando, la Agresanto, kaj por igi la tuton pli verŝajna, oni ellaboris detalan "vivon" por ĝi. La libro avertas, ke tiu lando, ties historio kaj registaro estas tute fikciaj, ke ĉiu simileco al iu nacio estas nura koincido. Konkretaj en la militekzercoj estis la apartaj uniformoj, kompleksa sistemo da

konvencioj, simboloj kaj... ties oficiala lingvo! Se vi ankoraŭ ne divenis: ESPERANTO estis la oficiala lingvo de la Agresanto.

La celo, nin atentigas la manlibro, estas simple memori la soldatojn, ke la realaj malamikoj ne havas la samajn taktikon, kutimojn, bazan filozofion aŭ armilojn kiel ili. Sekve oni povas ankaŭ konkludi, male ol Holivudo supozigas, la malamiko ne parolas la saman lingvon de usonaj soldatoj.

Ĉio estas detale priskribita kaj kun multaj koloraj bildoj, flagoj, farbitaj simboloj sur veturiloj, ĉiurangaj uniformoj, insignoj, medaloj. La nacia koloro? Verda! La nacia flago, blanka kun verda triangulo, tuj pensigis min pri nia provinco Minas Gerais. La Minas Gerais de esperantistoj.

Laŭ la priskribo, la Agresanta Armeo formiĝis en 1945, en la fino de la Dua Mondmilito, kiam regis (nur tiam?) malordo en la mondo. Partio kies nomo estus tradukebla per "Cirklo kaj Trieĝo" estis la reganta "forto", kies naciismo similus al tiu de nazistoj. Ke partio havas simbolon kaj la simbolo enestas la nacian flagon,

tio estas nur la plej frapa indiko pri bone konata sistemo, iam pli reala ol imagebla. Oni legas ankaŭ, ke la popolo de la Agresanto estas daŭre sub influo de la Partio.

Kuriozaj detaloj abundas. La Agresanta valuto nomiĝas "fralmato" (?). Unu fralmato dividita je 100 "centoj" (tiel) egalas al duona usona dolaro. La libro prezentas la salajrtabelon de la militistoj, de marŝalo (2000 fralmatoj monate) ĝis senranga soldato (90 fralmatoj), kaj eĉ kompletan pensio-sistemon. Kiel tio utilis en la ekzercoj, mi ne kapablas imagi. Oni ekscias, ke pro la rigida kontrolo de inflacio en la areoj invaditaj de la Agresanto, en Januaro 1950 la fralmato fariĝis pli forta antaŭ dolaro kaj ekvaloris USD 0,70. Brazilo sendube festus Agresantan ministron pri ekonomio.

La Agresanta Lingvo

La libro "Esperanto, the Aggressor Language" (FM-30-101-1)² anstataŭas la samnumeran manlibron kaj du apendicojn el junio 1947. Duono de la libro esta dediĉita al la gramatiko kaj dudirekta vortareto. Oni "rakontas", ke Esperanto estis adoptita kiel la oficiala lingvo de Agresanto. Se ĝi ankoraŭ ne komplete anstataŭis la regionan uzon de la hispana, franca, itala, germana kaj aliaj lingvoj en la regionoj invaditaj, "oni atendas, ke tio okazos en la venonta generacio". Cetere la libro memorigas, ke la adopto de Esperanto mem ne malpermesas, ke Agresantoj uzu (siajn) naciajn lingvojn, do jen ankaŭ en la fikcio konserviĝis la spirito de Esperanto. Tiuj Agresantoj ne estis tiom malinteligentaj...

La "oficiala" lingvo plejparte aperas sub la nomo Esperanto, sed foje oni skribas "Aggressor" (la Agresanta), kiel en vortareto "English Aggressor" aŭ en frazo "Prefixes and suffixes are used in Aggressor as in Esperanto" (Prefiksoj kaj sufiksoj estas uzataj en la Agresanta same kiel en Esperanto). Por la implicite paca ideo de Esperanto la nomo Agresanto orelfrapas min.

En la vortareto aŭ ekzemploj mi apenaŭ trovis vorton, kiu ne estas pure esperanta. Plej grave, niaj fundamentaj 16 reguloj restis netuŝitaj. Mi avertas la malamikojn de niaj supersignoj kaj ceterajn deĵorantajn reformistojn: la usona armeo ne decidis uzi ian modifitan Esperanton. ĈIUJ supersignoj konserviĝis. La adjektivoj plu ricevas la finaĵon -j laŭ pluralo. Ĉu eblas pli nesupektinda pruvo, ke Esperanto estas funkcia lingvo, tia kia ĝi estas? Se oni simple bezonus simplisman lingvo-skemon por la soldatoj, ĉu la armeo ne estus uzinta iun reformitan (probable kripligitan) Esperanton? Tio montras, ke ne nur esperantistoj konsideras ĝin sufiĉe taŭga lingvo tia, kia ni konas ĝin.



² Eblas legi en la reto:

<https://books.google.ru/books?id=GtqEAAAIAAJ&ots=d9MgbVyJrK&dq=esperanto%20agressor%20language&pg=PP5#v=onepage&q&f=false>

En la taktiko-libro 30-102, la mallongigoj estas ĉiuj esperantaj. La libro montras, ke insignoj de "Flight Engineer" havas literon "A" (laŭ Aviada Inĝeniero) kaj "Gunner" havas literon "K" (Kanonisto). Sur mapoj, militunuoj "Service" reprezentigas per simbolo "DE" (Dejoro), "Weather Observation" per "V" (Veterobservado) kaj "Road Construction" per "VK" (Voj-konstruado), nur por resti je kelkaj ekzemploj. En la vortaro, tabeloj kun esperantigitaj geografiaj nomoj, landoj kaj naciecoj. Troviĝas ankaŭ listo de ses referencaj verkoj, por la soldatoj, kiuj volus pli kompletan klarigon kaj vortprovizon de la Agresanta, i.a. "Esperanto, the Universal Language" (O'Connor), libro el 1903(!) kaj "Esperanto Grammar and Commentary", de majoro-generalo George Coy (brita esperantisto forpasinta en 1909).

*FM 30-101-1

FIELD MANUAL } HEADQUARTERS, PM
 No. 30-101-1 } DEPARTMENT OF THE ARMY 3235
 WASHINGTON 25, D.C., 25 February 1922 U.S.

ESPERANTO, THE AGGRESSOR LANGUAGE

SECTION		Pages	Page
I.	INTRODUCTION		
	Purpose and Scope.....	1	1
	General.....	2	1
II.	GRAMMAR		
	Rules of Grammar.....	3	4
	References.....	4	8
III.	VOCABULARY		
	Abbreviations.....	5	9
	Words.....	6	9
	Verbs.....	7	9
	English-Esperanto.....	8	9
	Esperanto-English.....	9	119
	Common Phrases in Everyday Conversation.....	10	214
	Geographical Names.....	11	220
	Proper Names.....	12	228
	Days and Months.....	13	230
	Numerals.....	14	230
	Weights and Measures.....	15	232
	Table of Approximate Conversions.....	16	233

* This manual supersedes FM 30-101A, 14 July 1928.

TAGO 4948-P46

1

Kiu tia havis la ideon enkonduki Esperanton en ekzercojn? Ĉu tion influis la ĵusa kontakto de usonanoj kun eŭropaj esperantistoj dum la Dua Mondmilito? En franca flugfolio el decembro 1944 mi legis (danke al amiko Jean Amourouy) pri la parolado de leŭt. Charles Simon en kuneno de Pariza E-Grupo ĉe Sorbonne. Usona broŝuro "Kiu estas kiu inter usonaj esperantistoj" (1945), listigas la fratojn Simon, kiel leŭtenantoj servantaj en Britio kaj en Hindio. Ĉu tiuj fratoj iel atentigis altrangulojn pri Esperanto? La sinteno de la nemenciita(j) aŭtoro(j) de la manlibro por Esperanto estas tute respektemaj, kaj oni relieflgas, ke ekzistas Esperanto-parolantoj en la reala mondo.

Aliflanke, mi scivolos ĉu la uzado de Esperanto por tiu celo kaj la kampanjo de makartismo iel rilatas. En a komenco de la 50-aj jaroj on vivis en Usono momenton kiam la timiga senatano Joseph Macarthy povus akuzi pri komunismo eĉ arbon de ruĝaj folioj. En tia etoso, estro de la tiama EANA (E-Asocio de Norda

Ameriko), laŭ rakonto el "Esperanto en perspektivo", startis en sia organo "Amerika Esperantisto" kalumnian kampanjon pri komunisma infiltrado en UEA. Ankaŭ anglalingve por ekstera publiko! Li evidente estis eksigita de UEA, lia Asocio formortis kaj ĝin anstataŭis paralela kaj ĝisnuna ELNA.

La fino de lando

Mi sukcesis trovi en interreto kaj komuniki kun usona ekssoldato, kiu havis kontaktojn kun skipo de Agresantaj soldatoj. Li konfirmis al mi la informon, kiun mi havis pri la fino de tiu projekto. La Agresantoj konstante deĵoris en tiu sama teamo kaj tial ili estis bonege preparitaj, pli ol la ordinaraĵ soldatoj, kiujn ili devis

trejni. Superaj en la batalekzercoj, tio certe ne estis utila por la animstato de la senspertaj ordinaraĵoj trupoj.

La plej decida faktoro tamen estis la troa entuziasmiĝo de la Agresantoj. Ili havis unikan uniformon kaj propran lingvon, tial ili komencis senti sin parto de ekskluziva komunumo. Lingvo evidente rolis kiel identiga propraĵo. Ili forgesis sian apartenecon al la sama armeo de la ceteraj usonanoj kaj kelkaj ofte provokis disputojn ekster la deĵorhoroj. La provoj teni ilin sub disciplino (porti la apartan uniformon estis malpermesate) estis vanaj. Iaspeca raŭmisma efekto, se la filozofoj de nia movado permesas al mi leĝeraniman komparon, kondukis al la fino de la "lando" kun oficiala lingvo Esperanto. El la libroj, unu el la plej pensigaj detaloj estas grandlitera averto sur komenca paĝo: "La trupoj rolantaj kiel Agresantoj estas usonaj soldatoj. Ne vundu ilin, nek damaĝu ilian aparataron". Necesis bridi la entuziasmon de la soldatoj, kiel oni faras al infanoj en viglaj ludoj. Alikaze, meze de batalo oni povus revii pri gloraj venkoj kaj vundi kunulon. Ho, se ĉiu milito estus tia, se en ĉiu soldata instruo estus la averto "La trupoj rolantaj kiel Agresantoj estas homoj, same kiel vi, tial ne mortigu ilin"!

Manlibroj, kiuj rilatas al Agresantoj (la datoj de la eldonoj estas tiuj, kiujn mi posedas aŭ ili aperis en diversaj eldonoj):

- FM-30-101 The Maneuver Enemŭ (Jan. 1953)
- FM 30-101-1 Esperanto, the Aggressor Language (Feb. 1962)
- FM-30-102 Handbook on Aggressor Military Forces (Sep. 1955) kun mapo pri la fikcia lando: ĝi korespondas en Ameriko pli malpli al suda Usono.
- FM-30-103
- Aggressor Order of Battle (Jun. 1955)


Detala kataloga skemo de iuj Agresantaj militunuoj, taĉmentoj kaj estroj. Fikciaj homoj de la oficejoj de la Agresantaj fortoj prezentas multnaciajn devenon.

La plej konataj nomoj por ni estas Peron, Ĝuintana, Ĝuevedo, Bianchi, Magalhaes, Leal, Brunet, Amato, Aguiar, Zimmermann, Rosas, Ruiz k.a.

La Usona Armeo kaj Esperanto

"En la 50-aj jaroj Esperanton uzis la usona militistaro. Ĉu kredeble? Ne, nur la senlima imagopovo de nia samideanaro..." Tiel skribis BEL.

Tamen tio ne estis pura mito. Tiam laŭ onidiro la usona ĉefa komando intencis ŝajnigi pli reala sian manovran militludon, kaj pro tio misuzis Esperanton. La atakema, "malamika" armeo uzus fremdan lingvon, nekompreneblan por defenda, nacia armeo. Kaj tiu malamika fremda lingvo estus Esperanto. Mi ne scias, ĉu la usonaj militistoj fakte havis tian planon, aŭ ĉu ili ĝin efektivigis. Sed restas fakto, ke en la esperantistaj medioj oni pasie diskutis la miraklan (NEGATIVAN) efekton por nia movado, se Esperanto estus "rangaltigita"?! al la kategorio de malamika lingvo. Krom tio, la armeo certe masakrus nian idiomon, adaptante ĝin al siaj celoj...



*de James Piton
el Brazila Esperantisto n-ro 311, junio 2000
Laŭ ret-info: Eventoj-197, 198*

SECTION I

INTRODUCTION

1. Purpose and Scope

This supplement provides United States forces, portraying AGGRESSOR, with a different language, the use of which will enhance intelligence play and add realism to field exercises. Included are an elementary grammar of the Esperanto language, English-Esperanto and Esperanto-English vocabularies, a table of commonly used phrases in everyday language and special tables on days and months, numerals, weights and measures, and approximate conversions.

2. General

a. Esperanto is *not* an artificial or dead language. It is a living and current media of international oral and written communication. Its basic rules of grammar are such that it will remain a live language because it can assimilate new words that are constantly being developed in existing world languages.

b. Esperanto was originally developed in 1887 by Dr. L. L. Zamenhof, a Russian physician who was seeking a common denominator for the different nationalities of the world to use as a means of communicating with each other. This new language took the name of the pseudonym (Dr. Esperanto—one who hopes) under which Dr. Zamenhof wrote.

c. The newborn language was accepted reluctantly and its growth was slow until early in the 20th century. During the Third Assembly of the League of Nations in 1922 the Esperanto language was adopted as the International Auxiliary Language. This act gave the language the much needed impetus and it is now published in 39 languages ranging from Afrikaans to Yiddish with the notable exception of Chinese. It is pointed out that Esperanto is not a language that was invented by Aggressor for use of the military forces, but rather it was adopted by Aggressor because of its international flavor. It is therefore consistent with the neutral or international identification implied by Aggressor.

2

AGO 4800B

См. также копию книги Google


d. Although Esperanto has been adopted as the official Aggressor language, it is not intended to prohibit the oral or written use of any foreign language or dialect by prisoners of war, casualties or other Aggressor personnel, or in the preparation of documents for use in intelligence training.

Enkonduko al la libro "Esperanto. The aggressor language"

Kultura historio

La unua rusa traduko de Laŭzi.

Gennadij Ŝlepĉenko



En 2012 Fremdlingva Eldonejo en Pekino eldonis libron de fama antikva filozofo Laŭzi "Dao de Jing". Rektan tradukon el la antikva ĉina lingvo en Esperanton faris emerita ĉina mezlerneja instruisto, samideano Wang Chongfang.

Se Leo Tolstoj ekvidus la libron, verŝajne li ekĝous, kaj ne nur pro tio, ke li estis adepto de Esperanto. Reale li dufoje partoprenis en tradukado de verko de Laŭzi en la rusan lingvon: kun rusa tradukisto E. Popov, kaj kun japana tradukisto Masutaro Konisi (1862 - 1940).

Estante spertulo pri la ĉina lingvo kaj antikva ĉina filozofio, M. Konisi sukcesis fari tradukon de la verko de Laŭzi el originalo. Post kvarmonata streĉa kunlaboro la libro estis publikigita. Redaktoro de

la libro estis Leo Tolstoj.

La unua japano, kun kiu konatiĝis kaj amikiĝis Leo Tolstoj, estis Konisi Masutaro – japana sciencisto, publicisto, filozofo kaj tradukisto. Masutaro naskiĝis en 1862 en provinco Okajama en familio de apotekisto. Jam kvarjara Konisi komencis lerni kaligrafion helpe de sia avino. Kiam li iĝis sepjara, li dungiĝis en uzinon kiel skribisto. En la uzino Konisi Masutaro hazarde renkontiĝis kun pastro de Ortodoksa eklezio, kaj en 1879 li iĝis adepto de ortodoksismo. En eklezia akademio (Tokio) li lernis la rusan lingvon. Pro bona lernado oni sendis lin en Kiev-an seminarion (nun Ukrainio). Post kvar jaroj li iĝis studento de histori-filozofia fakultato de Moskva universitato.

En novembro 1892 Masutaro unufoje vizitis domon de Leo Tolstoj, kie ĝis marto de sekva jaro li laboris kun la fama rusa verkisto. En tiu tempo Leo Tolstoj estis 68 jaraĝa, kaj Masutaro estis 26 jara.

Jen kion skribis Konisi Masutaro pri tio:

"Por ke en Rusio aperu plej bona traduko de Laŭzi, - diris Leo Tolstoj, - mi estas preta helpi al Vi per korektado fari ĝustan tradukon. Mi kun granda ĝojo akceptis proponon de Leo Tolstoj, kaj kun traduko de Laŭzi dum kvar monatoj regule vizitis la verkiston. Tolstoj komparadis mian varianton de la traduko kun variantoj de la traduko el angla, germana kaj franca lingvoj. Tiamaniere mia traduko estis finita

kaj unuafoje estis eldonita en revuo "Problemoj de filozofio kaj psikologio" 25-an de februaro 1912 en Moskvo."

En fino de Oktobro 1893 Konisi Masutaro revenis Japanion.

En iu suna tago en 1913 Konisi ricevis grandan poŝtan sendaĵon el Rusio. Ĝi enhavis kelkdek flavkolorajn libretojn "Laŭzi". Do, tri jarojn post morto de Leo Tolstoj en Rusio estis eldonita la unua rusa traduko de Laŭzi "Dao de Jing".



Misutaro Konisi (1862-1940)

Kantoj



Blua birdo kanto de rusa rok-grupo «Tempomaŝino», vortoj kaj muziko de Andrej Makarevič

Синяя птица
(песня группы
«Машина времени»)

Мы в такие шагали
дали,
что не очень-то и
дойдѣшь,
мы в засаде годами
ждали,
невзирая на снег и
дождь.

Мы в воде ледяной
не плачем,
и в огне почти не
горим.

Мы – охотники за
удачей,
птицей цвета
ультрамарин.

Говорят, что за эти годы
синей птицы пропал и
след,
что в анналах родной
природы
этой твари в помине нет.

Говорят, что в
дальние страны
подалась она
навсегда, –
и только мы
завяляем прямо:
это полная ерунда!

Traduko de **Rustam
Karapetyan**
(Krasnojarsk)

Ni paŝadis al tiuj lokoj
Kien tuj ne troviĝos breĉ'
Ni embuskis dum jaroj
longaj
Senrigarde al pluv' kaj
neĝ'
Ni ne ploras en akvo
frida,
Ne bruligas flamego nin
Ĉasas ni de fortuno
birdon
Je koloro akvamarin'.

Oni diras ke dum
lasttagoj
Spur' de birdo perdiĝis
jam
Ke en nia naturo darka
Malaperis ŝi en malfam'
Ke forflugis ŝi de rutinoj
Kaj nun vivas en fora
lok',
Sed nur deklaris ni kun
obstino:
Tio estas nur plen-
mensog'

Traduko de **Valentin
Melnikov (Moskvo)**

Ni paŝadis al foraj foroj,
ne venkeblaj sen
fortostreĉ',
en embuskoj dum longaj
horoj
malatentis pri pluv' kaj
neĝ'.
Ni ne brulas en flam'
terura,
kaj ne ploras eĉ sub
tajfun'.
Ni – ĉasantoj de l'
bird' lazura –
firme kredas je la
fortun'.

Onidire dum lastaj jaroj
de ĉi birdo vanuis spur',
kaj jam mankas lazur-
birdaroj
en analoj de la natur'.
Blua birdo fuĝis
transmare,
malaperis post
horizont', –
sed asertas ni
senerare:
tio estas mensog' sen
hont'!

Синей птицы не стало
меньше,
просто в свете
последних дней
слишком много мужчин
и женщин
стало сдуру гонять за
ней.

И пришлось ей
стать осторожней,
чтоб свободу свою
спасти,
и вот теперь почти
невозможно
повстречать её на
пути.

Стала пуганой птица
удачи
и не верит людским
рукам.
Да и как же ей быть
иначе? –
браконьеры и тут, и
там.

Подкрадётся –
она обманет,
и вот уже навсегда
ушла,
и только небо тебя
поманит
синим взмахом её
крыла.

Estas multe da birdoj
bluaj
Nur sub lumo de nuna
temp'

Troas kvanto de aviduloj
Kiujn tentas magia ŝveb'
Ŝi fariĝis pli singardema,
Por ke restu libera plu
Kaj jen ne eblas renkonti
tremon
De flugiloj laŭ voja flu'

Malkuraĝis la bird' magia
Kaj ne fidas al homa
man'.
Sed ne povas ŝi ja aliel,
Ĉar latronoj ĉirkaŭas jam.
Ŝtele venos vi - ŝi elglitis,
Kaj jen jam svenis en
suna bril,
Kaj la ĉielo nur vin
incitos
Per sving' blua de la
flugil'.

De la birdoj ne sinkis
kvanto,
sed laŭ nuna pragmata
mor'
troabundas la dezirantoj
persekuti ĝin kun fervor'.
Kaj la birdo jam sin
defendas,
ja valoras por ĝi
liber',
do nun vane oni
pretendas
ĝin renkonti ie sur
ter'.

Ĝi ne fidas al homaj
manoj –
ne mirindas la timo, ĉar
en arbustoj kaj inter
kanoj,
ĉie gvatas malicular'.
Ŝtele rampas vi –
sed jen moke
ĝi eskapas en pompa
bril',
kaj nur ĉiele vin
logos voke
blua svingo de la
flugil'.



СИНЯЯ ПТИЦА Blue bird

Слова и музыка А. МАКАРЕВИЧА

Vortoj kaj muziko de A. Makarevič

Умеренно скоро

Am

Мы в та - ки - е ша - га - ли да - ли, что не

о - чень - то и дой - дешь, мы в за - са - да го - да - ми жда -

.. ли, не - взи - ра - я на снег и дождь, мы в во -

A7

.. де ле - дя - ной не пла - чем и в ог - не поч - ти не го - рим,

Dm E Am E

мы - о - хот - ни - ки за у - да - чей, пти - цей цве - та уль - тра - ма - рин.

Am E Am E

Мы - о - хот - ни - ки за у - да - чей, пти - цей цве - та уль - тра - ма - рин.

1. Am 2. Am 3. Am Bbm

//... да. //... ти. ку - ку!

CERBE kaj KORE

n-ro 12 (80), decembro 2019

Kultura suplemento al la revuo "Ponto" n-ro 109

[eksa Bulteno de REU (BdR)]

"Ponto" estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo "Rusia Esperantista Unio
Oni rajtas uzi kaj represi ĉiujn materialojn de la eldono nur kondiĉe de
ĝusta indiko de la fonto

Ckk atendas viajn prozajn, poeziajn, interlingvistikajn, instru-metodikajn kaj scienc-
popularajn kontribuojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov nikolao@yandex.ru.

Estraro de Rusia Esperantista Unio

Redaktofino 25.12.2019